La Riverego
kebekia esperantista bulteno
Majo 2004 Esperanto-Societo Kebekia Jaro 18, N. 76

# Unua interreta voĉa babilado

**La 10an de aprilo 2004, okazis la unua interreta voĉa babilado inter Parizo kaj aliaj urboj en la mondo.**

Kiel anoncite, okazis la 10an de aprilo 2004, unuafoje en la historio de Esperanto, parola kunveno inter Parizo kaj pluraj aliaj urboj en la mondo, pere de la Interreto, kadre de la unua publika demonstrado de la senpaga komputila telefono *Skype*.

Tiam, en la sidejo de Unuiĝo Franca por Esperanto en Parizo, aŭdeblis dum tuta posttagmezo akĉentoj el diversaj partoj de la mondo. Ĉiam novaj voĉoj, aŭ nenovaj ĉar delonge ne aŭditaj de malnovaj amikoj, kelkfoje belaj voĉoj de ĝis tiam nekonat(in)oj. La sperto povas esti iel emociiga, ĉar la alta sonkvalito de la ilo povas kelkfoje doni la impreson ke la persono sidas apud vi kaj parolas ĉe via orelo, kvankam ekzemple vi estas en Parizo kaj la alia en Pekino.

En la pariza sidejo pasis kaj provis kelkaj samideanoj, bedaŭrinde ne vere amase. Malbonŝance, samtage okazis kongreso de SAT-Amikaro kaj kunsido de JEFO-anoj en alia urbo...

Feliĉe, partoprenis la skajpanoj (tiel oni nomas uzantojn de la ilo) el diversaj landoj. Tiel, ni en Parizo parolis dum pluraj horoj kun samideanoj el Pollando, Kanado kaj diversaj lokoj en Usono, Ĉinio kaj eĉ Francio! Ja, plej multnombraj estis tiam francoj kaj ĉinoj. Ĝenerale, tiuj ambaŭ landoj estas tiuj, kiuj havas plej multe da skajpanoj, en Francio pro forta reklamo en la Esperanto-Movado pri la ilo, kaj en Ĉinio por enorma sopiro de la Esperantistoj al komunikado kun la cetero de la mondo.

Pluraj konversacioj okazis pluropе: la ilo ebligas babili ĝis kvinope, kio estas sufiĉa kvanto ĉar jam je tiu kvanto, ne estas ĉiam evidente scii kiu parolas, des pli kiam temas pri nekonataj voĉoj. Ankaŭ iom amuze: ju pli da homoj konversacias samtempe, des pli ili hezitas paroli, kaj okazas silento dum kelkaj sekundoj, sed... temas ja pri internacia silento!

Tiuj, kiuj ne sukcesis trafi Parizon, pro trookupiteco de linio tie, sukcesis tamen babili kun aliaj tiam ĉeestantaj skajpanoj.

Ni, parizanoj, deziras danki ĉiujn kiuj partoprenis al la evento. Estis jam granda plezuro tion provi, sperti kaj sukcesi kun vi. Speciale dankindas ĉiujn ĉinajn samideanojn, kiuj prokrastis malfrunokte sian enlitiĝon por paroladi kun ni.

Ni klopodos en la pariza sidejo daŭre esti konektitaj kaj alvokeblaj, ĉiujn 2ajn kaj 4ajn sabatojn ĉiumonate, je la samaj horoj inter la 15a kaj la 19a je universala tempo+2. Denove, ĉeestantoj kun plezuro babilos kun vi, inkluzive kun tiuj kiuj ne bonŝancis partopreni la premieron.

Espereble, tiu unua evento estos poste de multaj aliaj sekvata, kaj okazos samtipaj demonstroj aliloke en la mondo. Estas sufiĉe facile organizi tion, des pli ke skajpanoj havas sian retliston "skajpanoj" ĉe *Yahoo*. Sufiĉas anonci la aferon kelkajn tagojn antaŭe, kun precizaj horoj en diversaj lokoj de la mondo.

Surloke, endas havi PC-on kun mikrofonon kaj retaliron, prefereblege ADSL-tipa se oni volas demonstri kun pluropaj samtempaj parolantoj. En Parizo, ni bonŝance havis PC-on kun du son-

*Sekvo: P. 4*

# Montrealo, Kebeko kaj Kebekio

**Ne maltrankviliĝu! Ne temas pri artikolo pri geografiaj terminoj! Sed pri loka agado kaj monaj aferoj.**

Ni unue memoru, ke la ĉi-jajra MezKanadaRenkontiĝo (MEKARO) estis unue planita okazi en Kebeko. La disiĝo de la Kebeka grupo bedaŭrinde devigis ĝin okazi en Montrealo. Nu, ĉu ĝin organizas la Montreala grupo? Tute ne! La Montreala grupo ne plu ekzistas.

Sekve, MEKAROn kaj aliajn Montrealajn rekontiĝojn organizas la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) de pluraj jaroj, kiam estis malfondita la Montreala Esperanto-Klubo. Kial? Ĉar la agantoj de ESK kaj tiuj de MEK jam delonge estis la samaj homoj. Tiel, sub la instigo de Sylvain Quirion, por plisimpligi la tuton, ESK transprenis tiun respondecon.

Sed, kvankam ESK havas sian sidejon en Montrelo kaj malgraŭ tio, ke ĉiuj ties estraraj loĝas en la Montreala regiono, la agado de tiu societo ampleksas tutan Kebekion. Almenaŭ teorie. Sekve, mi trovas bedaŭrinde, ke Kebekia agado, kies monon kontribuis membroj de tuta Kebekio, agas kiel loka klubo. Ŝajnas ke nur mi vidas problemon en tia situacio. Sed solvon mi ne vidas: Esperanto tutsimple ne havas sufiĉe nombrajn agantojn. Ĉiuokaze, preskaŭ neniu plu ĉeestas la Montrealajn renkontiĝojn, nu...

*Sylvain Auclair*

## Une aubaine

Saviez-vous qu'à 32 $ l'an, l'abonnement à la revue Le Monde de l'espéranto constitue une aubaine? En effet, en France, l'abonnement annuel à cette revue française est offert contre 30 euros, ce qui représente entre 45 $ et 50 $. Comme il s'agit du meilleur moyen de se tenir informé en français du mouvement espérantiste mondial, c'est à se demander pourquoi les membres de la SQE n'y sont pas abonnés!

*Sylvain Auclair*

# Ĉu plu *La Riverego?*

**Interreto havas grandan influon ĉe ĉiujn asociojn. Niafake, ĝi ebligas tujan lernon kaj uzon de Esperanto, sen la bezono aliĝi al klubo aŭ societo kaj pagi ties kotizon. Tiel, eĉ se nia propagando estas efika, la membraro de nia Societo kaj de aliajEsperanto-asocioj malkreskas.**

Tio kreas al ni monajn problemojn. Kvankam ni povus deziri tion, ni ne havas la rimedojn sendi niajn eldonaĵojn al ĉiuj interesatoj pri Esperanto; ni devas limigi nin al la pagintaj membroj. Aliaj asocioj, kiuj havas registarajn subvenciojn aŭ aliajn rimedojn, povas agi malsame; ni, bedaŭrinde, ne.

Tamen, ni povus limigi niajn elspezojn - kvankam devas esti limo al mona malkresko. Ekzemple, ni ĉesigis nian telefonan abonon, konsidere, ke preskaŭ neniu plu uzis tiun aparaton por kontakti nin. Same, ni povus ĉesi eldoni tiun revueton kaj pagi ties afrankon, anstataŭante ĝin per regulaj aŭ neregulaj retpoŝtaj leteroj.

Kion opinias niaj membroj pri tio? Kaj kion vi opinias pri tiuj du problemoj: kiel tamen atingi tiujn el niaj membroj, kiuj ne posedas interretan ligon? Ĉu tamen al ili sendi paperan represon de niaj retbultenoj? Kaj, pli grave, almenaŭ por kasisto, kiel tamen inviti la ricevantoj pagi kontizon, por tamen kapabli plenumi niajn aliajn taskojn?

*Sylvain Auclair*

## La Societo nun atingebla ĉe

### www.esperanto.qc.ca

Dank'al la laboro de Jérôme-Frédéric Bouchard, la Esperanto-Societo Kebekia nun havas multe pli facile memorigeblan retadreson: www.esperanto.qc.ca.

La antaŭa adreso estis www3.sympatico.ca/esperanto. Tiel, ke ne eblis entajpi ĝin senpere por trovi nin, aŭ memori ĝin post malrapidan rigardon al ia ajn informilon de la Societo.

# Sukcesa 2ª MEKARO en Montrealo

**La 2ª MezKanada Renkontiĝo sukcese okazis en Montrealo de la 22ª ĝis la 24ª de majo. Ekzakte 30 partoprenintoj el Bostono, Toronto, Otavo kaj de diversaj lokoj en Kebekio ĝuis la turistecan programon.**

Sabate okazis viziti ĉe la Biodomo, tiel estas ekologia muzeo kun vivantaj plantoj, bestoj, birdoj, fiŝoj kaj tiel plu el la Amerikoj. Poste, estis bufeda vespermanĝo en la Botanika Ĝardeno kaj ĝis la noktiĝo, vizito tra diversaj ĝardenoj (ĉina, japana, alpa).

Dimanĉe, la rendevuo estis en la centra metroa stacio Berri por duhora vizito de la artaĵoj kaj arkitekturaj interesaĵoj de la metroo. Mateo McLaughlin tre lerte faris tion kaj estis mirige ke li povis respondi iujn ajn demandojn.

Ni tagmanĝis en subtera restoraciarejo kaj poste metroe iris al la insuloj por viziti la Biosfero. Ĝi estas muzeo dediĉita al la akvo. Eĉ eblis piedbane ripozi sin en la muzeo kaj tio fariĝi aparte amuza por la infanoj kun ĉeestis la viziton. La vetero tre belis kaj ni decidis vagadi iom en la malnova urbo antaŭ la vespermanĝo.

La malnova urbo plenis je homoj kaj malfacilis resti grupe. Ni vespermanĝis en Commensal, vegetara memservejo kaj longe babili tie. Dum kelkaj decidis resti tie, grupeto da bieremuloj kaj kolaemuloj foriris al loka bierejo *La mer à boire*. La vespero finiĝis per promenado tra la Latina Kvartalo kaj glaciumado en *Le Bilboquet* en Saint-Louis-placo.

Lunde, estis 2 programeroj: bufeda mantenmanĝo ĉe Montreala Esperanto-Domo kaj libro-bazaro samloke. Inter la 10ª matene ĝis la 15ª horo estis amika kaj vigla babilado pri plej diversaj temoj. Arono aparte ridigis nin per lia bela elparolado de la franca lingvo.

Jen finiĝis la 2ª MEKARO kaj restas en la memoro de la partoprenintoj, belaj momentoj pri amikeco kaj interesaj vizitoj. Nun la organizado de la 3ª MEKARO estas en la manoj de la torontanoj. Ili decidu, ĉu la aranĝo fariĝos tradicia !

*Normand Fleury*

# Ĝenerala kunsido

**La jara ĝenerala kunsido de la Esperanto-Societo Kebekia okazos vendredon 24ªⁿ de septembro de 2004, ekde 19:30, ĉe la sidejo de la Societo, 6358-A, rue de Bordeaux, Montrealo.**

**Tagordo**

1. Malfermo; elekto de kunsidestro kaj de protokolanto
2. Akcepto de la tagordo
3. Akcepto de la protokolo de la lastjara kunsido
4. Raporto de la estraranoj
5. Venonta agado
6. Fermo

*Sylvain Auclair*

# Assemblée générale

L'assemblée générale annuelle de la Société québécoise d'espéranto se tiendra le vendredi 24 septembre 2004, à compter de 19 h 30, au siège de la Société, au 6358-A, rue de Bordeaux, à Montréal.

**Ordre du jour**

1. Ouverture de l'assemblée; élection d'un président et d'un secrétaire d'assemblée
2. Adoption de l'ordre du jour
3. Adoption du procès-verbal de la dernière assemblée générale
4. Rapport des membres du conseil d'administration
5. Discussion sur l'action future
6. Clôture de l'assemblée

*Sylvain Auclair*

# Kio estas Skype?

**La softvaro *Skype* (prononcu "Skajp") ebligas uzi vian PC-on kiel telefononon, kondiĉe, ke ĝi havu mikrofonon. La softvaro troviĝas ĉe www.skype.com.**

Ĝi estas plurlingva. La Esperanto-versio estas finota, sed jam uzebla, kaj ni klopodos ke ĝi estu oficiale inkluzivita en la softvaro.
Ekzistas helppaĝo en Esperanto far Emilio Cid el Brazilio: www.esperantointernacia.hpg.ig.com.br/skype.htm
Kaj la skajp-uzantoj havas sian retliston:
www.groups.yahoo.com/groups/skajpanoj.

Oni povas diri ke Skajp' funkcias mirinde bone. Estas ne tro da malfruo en la parolo, kaj ĝenerale la voĉo sonas eĉ pli bonkvalita ol normala telefono, tiel ke oni povas havi strangan impreson de proksimeco, eĉ parolante kun iu sur alia kontinento. La softvaro estas senpaga, tute laûleĝa, funkcias eĉ per modemoj (56K), tute ne ĝenatas de la kontraŭfajrigiloj, kaj laŭ ties konstruanto ĝi entenas nek reklamon nek spjonvaron. Per "Skajp", eblas eĉ paroli plurope kune (ĝis kvin homoj)! La konversacio estas eĉ ŝifrita. Tio signifas, ke neniu povas spione aŭskulti vian konversacion. Sola problemeto estas ke momente, ĝi funkcias nur per Vindozo (minimume 98) kaj Pocket PC, sed ili promesas ontajn versiojn por Macintoŝo kaj Linukso (tamen iu jam sukcesis ĝin funkciigi sub Linukso per la vindoz-emulatoro Wine). Tre baldaŭ, ankaŭ eblos uzi ĝin por atingi klasikajn telefonojn (kontraŭpage ĉifoje, sed verŝajne rilative malmultekoste).

Regule uzas ĝin jam pluraj dekoj da Esperantistoj (aprilo 2004: 120 el 30 landoj) interalie homoj de la fama Esperanto-portalo *Ĝangalo*, la Brusela komunikadcentro, *El Popola Ĉinio*, Ĉina Esperanto Ligo, Unuiĝo Franca por Esperanto, Esperanto Nebraska, la Esperanto-parolanta kompanio *LinguaForce*, ktp.

Emilio Cid uzis ĝin okaze de radio-elsendo por la Esperanto-radio Agentejo Mondo, dum kiu li intervjuis samideanon Flavio Rebello, okaze de lia turneo en Eŭropo por la projekto ITV. Tiam, Emilio estis en Brazilio kaj samtempe Flavio estis en Francio! Vidu ĉe: www.radioarkivo.org/plenlisto.php/12 (9ª de marto).
Memoru kia enorma progreso estis la apero de la Interreto por la Esperanto-movado: antaŭ la Interreto, plejparto el ni povis konkrete praktiki Esperanton nur dum ferioj, do nur dum kelkaj semajnoj jare. Kaj de kelkaj jaroj, dank'al la Interreto, ni povas komuniki ĉiutage en Esperanto.
Ĝis nun, temis nur pri skriba komunikado, ĉar internacia telefono tro multekostis, kaj ne vere estis agrablaj interretaj paroliloj. La Interreto alportis tamen tiun grandan progreson de ĉiutaga komunikebleco. Sed nun alvenas nova epoko, ekde kiam denove dank'al la Interreto, ni finfine povos uzi nian lingvon ĉiutage, ankaŭ parole!

Kompreneble, bezonatas mikrofono, kio ĝenerale facile troveblas en komputilaj butikoj. Ankaŭ, plejparto de TTT-kameraoj nun havas internan mikrofonon.

*Philippe Bérezzi*

# Unua interreta voĉa babilado (sekvo)

konektingoj, kio nin ebligis konekti kaj laŭtparolilojn direkte al publiko, kaj "kaskon" por la konforto de la telefonanto.

Kompreneble, laŭ la kresko de la nombro de skajpanoj kaj konsekvenca diverseco, intereso same kreskos. Venos novaj homoj el ĝis nun ne uzantaj landoj. Eble eĉ iam oni vidos skajpi homoj el landoj, kie Esperanto ne estas tre konata. Ekzemple iam aperos la unuaj germanoj!!! ;-)
Niakaze, nur pro la anonco de la evento, ene de kelkaj tagoj, aperis trideko da novaj skajpanoj!
Facile imageblas ke dum kongresoj povos okazi tiaj demonstroj. Mi nun antaŭvidas ke niaj ĉinaj amikoj klopodos laŭeble tion proponi dum la UK. Sed ankaŭ en simplaj klubejoj, kial ne?
Mi eĉ iel opinias ke la kutima ĉiujara "Ago Tago" eble ekhavus alian dimension, ankaŭ rilate al gazetaro, se skajpus aktivuloj.

*Philippe Bérezzi*

# Subteno por grava reta projekto

**La estraro de UEA unuafoje decidis doni aŭspicion por reta projekto. La informan kaj moralan subtenon de la Asocio havos volontula grupo, gvidata de Tim Morley, kiu celas esperantigi la programaron *OpenOffice.org*.**

Sekvas klarigoj pri OpenOffice.org kaj la agado pri ĝia esperantigo, preparitaj de Tim Morley.

*OpenOffice.org* estas nekomerca, senpage distribuata programaro, kreata kolektive de volontulaj programistoj. Laŭ funkcioj ĝi estas tre simila al la konata oficeja programaro de Microsoft, t.e. *Word, Excel, PowerPoint*, ktp. Ĝi povas funkcii en pluraj operaciaj sistemoj, inkluzive Vindozo kaj Linukso. Interesiĝantoj povas elŝuti la programaron el www.openoffice.org aŭ aĉeti KD-on kontraŭ malgranda sumo ekzemple ĉe la "Linux Emporium" (http://www.linŭemporium.co.uk/products/applications/#pid4523).

La laboro estas ege granda, sed la efiko, kaze de sukceso estus vere signifa. Por sukcesigi la projekton oni bezonas pli da volontulojn.

Por tio oni serĉas personojn, kiuj:
— kapablas kompetente skribi en Esperanto
— komprenas la anglan, ĉefe la prikomputikan anglan
— havas komputilon (aŭ Vindoza, aŭ Linuksa)
— kapablas instali programojn en la komputilo
— havos kelkajn horojn ĉiusemajne dum iom da tempo
— deziras helpi esperantigi la programaron *OpenOffice.org*

Des pli bone se ili ankaŭ:
— havas grandtraigivan konekton al Interreto
— havas *Novan PIVon*, grandan (teknikan) vortaron anglan/Esperantan
— jam tradukis programojn
— jam uzis *poEdit* aŭ *KBabel*
— povas/scias uzi *Grep*
— havas *multe* da libera tempo

Tamen tiuj lastaj petoj estas deziretaĵoj, ne bezonaĵoj.

# NASK 2004 altnivelaj Esperanto-kursoj en Usono

Inter la 5an kaj 23an de julio, NASK (Nord-Amerika Somera Kurso) havos lokon en la monde konata interkultura altlernejo *The School for International Training* (La Altlernejo por Internacia Trejnado) en la nordoriento de Usono.
La instruista skipo pretigis trinivelan studprogramon, kiu emfazas aktivan uzadon de Esperanto en interkulturaj komunikado, kompreno, kaj kunlaboro.
Krome en 2004 estos speciala seminario por Esperanto-instruistoj pri modernaj instrumetodoj.
La kursoj estas pagendaj, sed stipendioj haveblas. Por pliaj informoj, bonvolu telefonvoki al Ellen M. Eddy (360-754-4563), aŭ retmesaĝi al eddyellen@aol.com, aŭ skribi helikpoŝte al:
11736 Scott Creek Drive SW,
Olympia WA 98512
Usono

# Une deuxième vie

Que faites-vous après que vous avez terminé de lire *Le Monde de l'espéranto?* Vous le jetez? Ouache! Vous le mettez au recyclage? Déjà mieux! Quant à moi, je lui offre une vraie deuxième vie. Je le laisse traîner sur une pile de revues dans une quelconque salle d'attente, de médecin, de dentiste, au CLSC, etc. Peut-être quelqu'un le feuillera-t-il, me dis-je. À tout le moins, des gens verront le mot "espéranto" et verront que notre mouvement existe!

*Sylvain Auclair*

# Venontaj aktivaĵoj de la Montreala Klubo

**Por la regulaj monataj renkontiĝoj de novembro ĝis junio, ni proponas al vi novan aktivaĵon: ni hazarde prenis nomojn de landoj, kaj ni invitas vin pretigi 5-10-minutan paroladon pri tio, kion vi konas pri tiu lando. Estas bona maniero praktiki la lingvon!**

Vendredo, la 25an de junio 2004, je la 19:30 (temo: Slovenio)
Vendredo, la 24an de septembro 2004, je la 19:30
Vendredo, la 29an de oktobro 2004, je la 19:30
Vendredo, la 26an de novembro 2004, je la 19:30

# Prochaines activités du *Montreala Klubo*

**Pour les réunions mensuelles ordinaires, de novembre à juin, nous vous proposons une nouvelle formule: nous avons pigé au hasard le noms de quelques pays. Nous vous invitons à préparer un petit exposé de 5 à 10 minutes sur ce que vous connaissez de ce pays. Une excellente occasion de pratiquer la langue!**

Vendredi 25 juin 2004, 19h30 (thème: Slovénie)
Vendredi 24 septembre 2004, 19h30
Vendredi 29 octobre 2004, 19h30
Vendredi 26 novembre 2004, 19h30

## Realiĝu frue!
### Réabonnez-vous vite!

**Sylvain Auclair**

La estraro de ESK tre ŝatus, ke la membroj sendu sian realiĝilon (kun la pago, kompreneble...) tuj post la ricevo.
Tio estas des pli grava se oni samtempe reabonas al *Le Monde de l'Espéranto*. Ĉar ni devas mendi la ĝustan nombron da ekzempleroj, malfrua reabono povus kaŭzi tion, ke vi maltrafos unu numeron.

Les administrateurs de la Société apprécieraient beaucoup que les membres renvoient leur formulaire de réadhésion (avec le chèque, bien entendu...) dès qu'ils le reçoivent. Cela est d'autant plus important si, par la même occasion, on se réabonne au *Monde de l'Espéranto*. Comme nous devons commander le nombre exact d'exemplaires, un réabonnement trop tardif pourrait nous empêcher de vous faire parvenir tous les numéros correctement.

*La Riverego* (*Le Fleuve*) est publié par la Société québécoise d'espéranto, en janvier, mai, septembre et novembre. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. *La Riverego* estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en januaro, majo, septembro kaj novembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indoko de la fonto. Fotokopiita 90-oble. Senpage por la membroj de la ESK.

**Échéance pour le prochain numéro/Limdato por la venonta eldono: 2004.08.15**

jessylapointe@hotmail.com

Rédacteur en chef/Ĉefredaktoris Jessy LaPointe. Administrateurs de la SQE/Estraranoj de ESK: Normand Fleury (président/prezidanto), Jérôme-Frédéric Bouchard (vice-président/vicprezidanto), Sylvain Auclair (trésorier/kasisto), Jessy LaPointe (secrétaire/sekretario) kaj Martin Benoit (administrateur/konsilanto).

**Esperanto-Societo Kebekia**
**Société québécoise d'espéranto**
6358-A, rue de Bordeaux
Montréal (Québec) H2G 2R8

esperanto@sympatico.ca
www.esperanto.qc.ca